# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

**N-ro 35** **Oktobro** **1929**

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENEVE

**TEKSTO** : La speciala mara konferenco. — La 46a kunsido de la Administra Konsilantaro de la Internacia Labora Oficejo. — Du Ratifikoj de Italujo. — Paĝo pri kooperado.

# La speciala mara Konferenco

La Dektria Kunsido de la Internacia Labora Konferenco, kiu estis la tria speciala kunsido pritraktanta la interesojn de la maristoj, malfermiĝis en Genève la 10-an de Oktobro. S-ro Eduardo Aunos Perez, Hispana Ministro de Laboro, estis unuanime elektita Prezidanto.

Tridekkvar Ŝtatoj estis reprezentitaj, inkluzive ĉiuj maraj Ŝtatoj, kun escepto de Norvegujo.

La Brita Delegitaro tamen estis nekompleta, ĉar la ŝipposedantoj rifuzis nomi delegiton pro la motivo, ke la organizaĵo de Britaj maristoj kompetenta por diskuti laborkondiĉojn en la komerca ŝiparo ne estas reprezentata. La Brita laborista delegito. S-ro Ben Tillett, estis elektita, laŭ la regulo starigita de la Packontrakto, de la Registaro konsente kun la plej reprezenta laborista organizaĵo, tio estas, la Trade Union Congress (Kongreso de sindikatoj), al kiu la Nacia Sindikato de Maristoj ne aliĝas, kvankam aranĝoj por ĝia aliĝo estas aktuale farataj.

En la unuaj tagoj de la Konferenco, la ŝipposedantoj proponis longan rezolucion, deklarantan ke la elekto de neregistaraj delegitoj kaj konsilantoj por Maraj Konferencoj devas esti farata konsente kun la organizaĵoj, se ili ekzistas, plej reprezentaj de ŝipposedantoj kaj maristoj respektive. La ŝipposedantoj deklaris, ke ili ne partoprenos en la diskuto de la demandoj en la tagordo, ĝis kiam ili estas certigitaj de la Konferenco (1) ke la metodo de elekto de neregistaraj delegitoj kaj konsilantoj estos modifataj laŭ ilia rezolucio kaj (2) ke la difektoj en la reprezenta karaktero de la nuna Konferenco estos laŭeble riparataj.

Tiu propono okazigis longan kaj vivan diskuton, en kiu la laboristaj kaj registaraj delegitoj kontraŭstaris la ŝipposedantojn, kaj fine la rezolucio estis malakceptita per 64 voĉoj kontraŭ 24. Konsekvence la delegitoj de la ŝipposedantoj retiriĝis de la Konferenco. La komitatoj elektitaj por studi la demandojn en la tagordo daŭrigis siajn laborojn sen la partopreno de la mastroj, kaj intertempe klopodoj fariĝis por aranĝi iun kompromison, kiu ebligus la revenon de la mastroj. Tiuj klopodoj fine sukcesis, kaj la 17an de Oktobro la Konferenco, per 54 voĉoj kontraŭ 19, akceptis la jenan rezolucion:

« Konsiderinte la malfacilaĵojn okazintajn en la specialaj kunsidoj de la Konferenco, inkluzive la konsiston de la neregistaraj delegitaroj, la Konferenco invitas la Administran Konsilantaro, ke ĝi serĉu ĉiujn taŭgajn rimedojn por eviti la reaperon de tiaj malfacilaĵoj.

La mastraj delegitoj tiam revenis al la Konferenco.

En la raportoj de la Komitato por la Kontrolo de Rajtigaĵoj estis diskutitaj kontraŭdiroj kontraŭ la rajtoj de pluraj delegitoj. Kiel en antaŭaj kunsidoj, la laboristaj delegitoj kontraŭstaris la akcepton de la Itala laborista delegito, sed liaj rajtoj estis konfirmitaj de la Konferenco per 65 voĉoj kontraŭ 22. La raportoj de la Komitato rekomendantaj la akcepton de la Bulgara kaj Finna laboristaj delegitoj estis akceptitaj sen diskuto. La plej grava kazo koncernis la Britan laboristan delegiton, S-ro Ben Tillett, kies elekto okazigis la foreston de la Britaj ŝipposedantoj. La Brita Registaro invitis la Kongreson de Sindikatoj, kiel la organizaĵon plej reprezentan, ke ĝi prezentu nomojn. La Kongreso nomis S-ro Tillett, kiu apartenas al la Federacio de Transportlaboristoj, kiel delegiton, kaj kiel konsilantojn, diversajn personojn, el kiuj pluraj apartenas al sindikatoj kunlaborantaj kun la Nacia Mara Konsilantaro. Unu sindikato, la de la maristoj, ne estis reprezentita, ĉar ĝi rifuzis nomi reprezentanton. La plimulto de la Komitato do opiniis, ke la Registaro observis la ordonojn de la Kontrakto, kaj rekomendis al la Konferenco la akcepton de la rajtoj de S-ro Tillett. La mastra reprezentanto en la Komitato argumentis, ke la Kontrakto intencis ke, pri specialaj Konferencoj, la delegito plene reprezentu la klason de laboro koncernatan, kaj ke S-ro Tillett ne havas tiun karakteron. Krom tio, la Kongreso de Sindikatoj postulas okhoran labortagon, dum la Sindikato de Maristoj deklaris, ke la ekonomia situacio ne rajtigas substancan ŝanĝon en laborhoroj surŝipe kaj ke la reguligo de laborhoroj estas afero por nacia kaj ne internacia aranĝo. La organizitaj Britaj maristoj estas do ne nur ne reprezentitaj, sed eĉ malreprezentitaj en la Konferenco.

Dum la diskuto en la Konferenco, la reprezentanto de la Brita Registaro rememorigis, ke la sama punkto estis proponita en la Mara Konferenco de 1926, kaj ke tiam oni decidis, ke la Brita Registaro precize observis la Kontrakton.

La Konferenco adoptis la raporton de la plimulto de la Komitato per 70 voĉoj kontraŭ 22.

Oni jam scias, ke la tagordo de la Konferenco enhavis la jenajn demandojn:

(1) Reguligo de laborhoroj surŝipe;

(2) Protekto de maristoj okaze de malsano, inkluzive kuracado de vunditoj surŝipe;

(3) Plibonigo de la vivkondiĉoj de Maristoj en havenurboj;

(4) Starigo de minimumaj kondiĉoj pri profesia kompetenteco por ŝipestroj kaj navigantaj kaj maŝinistaj oficiroj komandantaj la gardon sur komercaj ŝipoj.

Oni ankaŭ scias, ke, laŭ la proceduro per duobla diskutado, la tasko de la Dektria Kunsido estis, decidi ĉu tiuj demandoj estu metataj en la tagordon de sekvonta kunsido por definitivaj decidoj. Tiaokaze ĝi ankaŭ devis difini la punktojn pri kiuj la Oficejo devas konsulti la Registarojn per demandaro antaŭ la dua diskutado.

Tiuj demandoj estis diskutataj de la Konferenco sur la bazo de la raportoj de la koncernataj Komitatoj. La unua demando

tiel diskutita estis tiu pri la vivkondiĉoj de maristoj en havenurboj. La Komitato prezentis plurajn konkludojn, kiuj, se akceptitaj de la Konferenco, konsistigos la bazon de la demandaro, kiun la Oficejo sendos al la Registaroj.

La konkludoj komence esprimis la opinion, ke la demando devas esti la temo de Projekto de Konvencio aŭ de Rekomendo. Poste estis pritraktitaj la jenaj punktoj:

(1) La starigo en la grandaj havenurboj de organizaĵoj reprezentantaj ŝipposedantojn, maristojn kaj instituciojn, por kolekti informojn pri aktualaj kondiĉoj kaj disvolvigi kaj kunordigi la necesajn rimedojn por la bonstato de la maristoj.

(2) La leĝa aŭ administra reguligo de la vendo de alkoholo kaj narkotaĵoj, la kontrolo de drinkejoj kaj gastejoj, kaj similaj aferoj.

(3) Rimedoj por la protekto de la sano de maristoj, inkluzive la organizo de propagando pri la danĝeroj de tuberkulozo, tropikaj, veneraj kaj aliaj malsanoj kaj de la kuracado de tiuj malsanoj.

(4) Plibonigo de la loĝado de maristoj kaj aranĝoj por transsendi salajrojn de fremdaj havenurboj al la familioj de maristoj aŭ por la regula transsendo al familioj de parto de la salajroj.

(5) Propagando por sukcesigi la proponitajn aranĝojn.

(6) La demando pri la provizo de mono por efektivigi la proponitajn aranĝojn.

La raporto estis adoptita unuanime, kaj la Konferenco decidis per 89 voĉoj kontraŭ 0, ke la demando estu metita en la tagordon de la sekvonta Kunsido.

La konkludoj de la raporto pri profesia kompetenteco celis Projekton de Konvencio stariginta, ke naciaj leĝoj postulu la posedon de atesto de kompetenteco, kiel kondiĉon por servi kiel ŝipestro, naviganta oficiro komandanta la gardon aŭ maŝinista oficiro komandanta la gardon. Per amendamento la Konferenco aldonis « ĉefaj maŝinistoj ».

Dum la diskuto la Nederlanda mastra delgito (S-ro Valstar) deklaris, ke la mastra delegitaro ne akceptas la kompetentecon de la Internacia Labora Organizaĵo pri ĉi tiu afero, kiu koncernas, ne nur la sandanĝerecon de maristoj sed ankaŭ tiun de pasaĝeroj kaj ŝarĝo kaj aliaj demandoj ekstere de la celoj de la Organizaĵo. La konkludoj ankaŭ preterpasis la proponojn de la ŝipposedantoj en la Komuna Mara Komisiono. La ŝipposedantoj tial voĉdonos kontraŭ la raporto.

La Sekretario Ĝenerala (S-ro Albert Thomas) diris, ke la demando pri kompetenteco neniam estis prezentita en la Komuna Mara Komisiono. Fakte, ĝis nun, la kompetenteco de la Organizaĵ pri ĉi tiu temo estis ĉiam akceptita.

S-ro Valstar diris, ke la ŝipposedantoj ne voĉdonis kontraŭ la raporto kaŭze de la dubo pri kompetenteco. Ili nur prezentis tiun demandon principe. Ili voĉdonos kontraŭ la konkludoj tial ke ili preterpasis la intencojn de la Komuna Mara Komisiono kaj de la ŝipposedantoj en la Konferenco.

Fine la ŝipposedantoj sin detenis de la voĉdono, kaj la Konferenco akceptis la konkludojn per 65 voĉoj kontraŭ 0. La Konferenco tiam decidis per 73 voĉoj kontraŭ 2, ke la demando estu metita en la tagordon de la sekvonta Konferenco.

Sekvis la demando pri la protekto de maristoj okaze de malsano. La Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo, laŭ propono de la Komuna Mara Komisiono, difinis tiun demandon jene:

(a) La individua respondeco de la ŝipposedanto kontraŭ malsanaj aŭ vunditaj maristoj;

(b) La asekuro de maristoj kontraŭ malsano.

La Komitato, al kiu demando estis komisiita, nomis apartajn raportantojn por la du aspektoj, kaj prezentis du raportojn, kiuj estis diskutitaj sinsekve.

La Komitato opiniis, ke la nuna demando devus esti la temo de projekto de Konvencio, kaj difinis en « konkludoj » la punktojn pri kiuj la Oficejo devos konsulti la Registarojn. Tiuj punktoj koncernis la ŝipojn kaj personojn pri kiuj la posedantoj devas respondi, la riskojn, kiujn la respondeco devas ampleksi, kaj la naturon kaj daŭron de la kompensoj pagotaj.

La ŝipposedantoj argumentis, ke en ĉiuj maraj landoj la leĝoj trudas al la ŝipposedantoj devojn okaze de malsano, vundado aŭ morto de maristoj. La raporto ne montras, ke tiuj reguloj estas tiel nesufiĉaj, ke ili « entenas maljustecon, mizeron kaj mankojn tiajn », ke « la paco kaj konkordo de la mondo estas minacata », por citi la vortojn de la Packontrakto. La ŝipposedantoj do opiniis, ke ne ekzistas urĝa motivo por ke la Konferenco agu. Ĉiuokaze, la granda varieco de la leĝoj, kutimoj kaj reguligoj en diversaj landoj faras aranĝon per Konvencio tute malkonvena kaj eĉ neebla. La Konferenco atingus praktikajn efikojn plibone per Rekomendo limigita al kelkaj precipaj kaj ĝenerale akceptitaj principoj.

Post viva diskuto, la Konferenco tamen adoptis la raporton per 65 voĉoj kontraŭ 16.

La dua raporto de la Komitato koncernis asekuron de maristoj kontraŭ malsano kaj ankaŭ celas Projekton de Konvencio. La konkludoj antaŭvidas sistemon de deviga asekuro. La raporto estis adoptita per 68 voĉoj kontraŭ 14.

La Konferenco tiam decidis, per 72 voĉoj kontraŭ 17, enmeti en la tagordon de la sekvonta Konferenco la demandon pri la protekto de maristoj kontraŭ malsano.

La raporto de la Komitato pri laborhoroj surŝipe invitis la Konferencon, ke ĝi decidu, ke konvenas konsulti la Registarojn pri la internacia reguligo de tiu afero per Projekto de Konvencio, kaj ke ankaŭ konvenas demandi al la Registaroj, ĉu tiu reguligo devas esti bazita sur la principo de la okhora tago aŭ kvardekokhora semajno, kun apliko de metodoj kaj esceptoj tiaj, kiajn la specialaj kondiĉoj de la ŝipindustrio necesigas. La konkludoj de la raporto detalas la punktojn, pri kiuj la Registaroj devas esti konsultataj.

La reprezentantoj de la ŝipposedantoj en la Komitato prezentis apartan deklaron, en kiu ili malkonsentis al la parto de la konkludoj, kiu akceptas la eblecon de Konvencio reguliganta laborhorojn sur la bazo de okhora tago aŭ kvardekokhora semajno. La konkludoj, ili diras, supozas, ke la Packontrakto devigis la Ŝtatmembrojn al la principo de okhora tago aŭ kvardekokhora semajno por maristoj. Tiu ideo, laŭ la opinio de la ŝipposedantoj, estas erara. La Konferenco estas libera por diskuti la demandon laŭ ĝiaj meritoj. Laŭ ĉi tiu vidpunkto, la ŝipposedantoj pensas, ke ekonomiaj cirkonstancoj malebligas la ŝipindustrion toleri iun ŝanĝon en la aktualaj laborhoroj surŝipe. Ili deziras reguligi laborhorojn tiel, ke ĉiu justa plendo estu forigita; sed ili estas konvinkitaj ke tio povas fariĝi efike nur per volonta kolektiva nacia interkonsento, kaj ne per deviga leĝfaro.

Pluraj Registaraj kaj laboristaj delegitoj kontraŭstaris la argumentojn de la ŝipposedantoj kaj S-ro de Rousiers, la reprezentanto de la Francaj mastroj ankaŭ anoncis ke li sin disigos de la mastra grupo kaj voĉdonos por la internacia reguligo de laborhoroj surŝipe. La apliko de la Franca Okhora Leĝo metis la Francan ŝiparon en malfavoran situacion. Tamen la Franca sperto montris ke la okhora labortago povas esti aplikata surŝipe, kaj la mondo devas profiti de tiu sperto.

Fine la konkludoj estis adoptitaj per 71 voĉoj kontraŭ 20.

La Konferenco tiam decidis, per 76 voĉoj kontraŭ 17, enmeti la demandon en la tagordon de la sekvonta Kunsido, tio estas la sekvonta speciala mara Kunsido.

La Konferenco akceptis, per 48 voĉoj kontraŭ 18, rezolucion petantan la Administran Konsilantaron, ke ĝi atentigu la Oficejon pri la kondiĉoj de vivo kaj laboro de Aziaj maristoj,

precipe kiam ili servas ekstere de sia lando aŭ sur fremdaj ŝipoj; kaj ankaŭ ke ĝi konsideru, ĉu tiu demando povos esti metita en la tagordon de baldaŭa Kunsido de la Konferenco.

Rezolucio, petanta la Administran Konsilantaron, ke ĝi konsideru la eblecon enmeti en la tagordon de baldaŭa Kunsido de la Konferenco la demandon pri la rajto je asociado, egale kun naciaj maristoj, de maristoj servantaj en la teritorioj, posedaĵoj aŭ kolonioj de fremda Ŝtato aŭ sur ŝipoj apartenantaj al naciuloj de fremdaj Ŝtatoj, estis ankaŭ prezentita. 45 voĉoj estis donitaj por tiu rezolucio kaj neniu kontraŭ. Tamen, ĉar kvorumo (55 voĉoj) ne estis atingita, la rezolucio ne estis akceptita.

La Itala Registara delegito, S-ro de Michelis, prezentis rezolucion rekomendantan la studon de la sendanĝereco kaj kondiĉoj de vivo, laboro kaj preparado de laboristoj en aerotransporto; kun la celo, enmeti tiujn demandojn en la tagordon de la venonta kunsido de la Konferenco. Tiu rezolucio estis akceptita per 53 voĉoj kontraŭ 7.

S-ro Woo, delegito de la Ĉina Registaro, prezentis rezolucion petantan la Administran Konsilantaron, ke ĝi konsideru aranĝojn por atentigi la Ŝtatojn pri la neceseco, ke justa traktado, laŭ la nacia socia leĝaro, estu certigita al Ĉinaj maristoj servantaj sur fremdaj ŝipoj, ĝuantaj ekstrateritoriajn privilegiojn, veturantaj en la teritoriaj aŭ enlandaj akvoj de Ĉinujo.

Ĉi tiu rezolucio estis amendamendita, tiel ke ĝi aludu ne speciale pri ĉinaj maristoj sur fremdaj privilegiitaj ŝipoj, sed nur ĝenerale pri maristoj servantaj sur ŝipoj veturantaj en la teritoriaj aŭ enlandaj akvoj de la Ŝtato de kiu tiuj maristoj estis naciuloj. Laŭ tiu formo ĝi estis apogita de la delegitoj de la Brita kaj Germana Registaroj kaj akceptita per 59 voĉoj kontraŭ 0.

La Konferenco akceptis, per 39 voĉoj kontraŭ 17, rezolucion petantan la Administran Konsilantaron, ke ĝi konsideru la enmeton en la tagordon de baldaŭa kunsido de la demando pri la traktado de laboristoj en enlanda navigacio, en la celo de ebla akcepto de Projekto de Konvencio.

S-ro Daud, delegito de la Hindaj laboristoj, prezentis rezolucion por la daŭrigo de enketo pri la plenumo de la devo de la Ŝtatoj, ke ili prezentu Konvenciojn kaj Rekomendojn al la kompetentaj aŭtoritatoj por leĝdono. Tiu rezolucio atentigis speciale pri la agado de Aziaj Ŝtatoj pri la Konvencioj kaj Rekomendoj akceptitaj de antaŭaj Maraj Kunsidoj kaj la Maraj Konvencioj akceptitaj de la ĝenerala Kunsido de 1921.

S-ro Daud, antaŭ ol proponi la rezolucion, akceptis amendamenton de la Japana Registara delegitaro anstataŭigantan la aludon pri Aziaj Ŝtatoj per « Ŝtatoj Membroj de la Internacia Labora Organizaĵo ».

La rezolucio estis akceptita per 55 voĉoj kontraŭ 7.

Rezolucio rekomendanta la studon de la demando pri minimumaj personaroj surŝipe ricevis 32 voĉojn kontraŭ 0, sed ne atingis la necesan kvorumon por esti akceptita.

Konsiderante tiujn rezultatojn, oni povas certe diri, ke la Konferenco bone sukcesis, malgraŭ la malfacilaĵoj de la komenco. Kvankam ĝi nur devis difini la punktojn pritraktotajn en la demandaroj, kiujn la Oficejo preparos pri la kvin demandoj en la tagordo, ĝiaj diskutoj tre profunde esploris ĉiujn tiujn problemojn, kaj stimulis la esperon, ke la dua stadio de la proceduro produktos valorajn decidojn.

### Du ratifikoj de Italujo

La ratifiko per la Reĝo de Italujo de la Konvencioj pri *dungokontraktoj de maristoj* kaj pri la *reenpatruijo de maristoj*, akceptitaj en la Naŭa Kunsido de la Konferenco (Genève, 1926), estis registrita de la Sekretario-Ĝenerala de la Ligo de Nacioj la 10an de Oktobro 1929.

## La kvardeksesa kunsido de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo

La kvardeksesa kunsido de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo okazis en Genève de la 4a al la 8a de Oktobro 1929.

La Direktoro anoncis plurajn ratifikojn de internaciaj laboraj konvencioj. Jugoslavio ratifikis la konvenciojn pri kompenso al maristoj pro senlaboreco okaze de ŝipopereo, pri dungoficejo por maristoj, pri rajto al asociado por agrikulturaj laboristoj, pri plumboblanko, pri dungokontraktoj de maristoj, pri plumboblanko, pri dungokontraktoj de maristoj, pri la reenpatrujigo de maristoj kaj pri asekuro kontraŭ malsano por laboristoj en industrio kaj komerco kaj domservantoj. Svedujo ratifikis la konvenciojn pri inspekto de elmigrantoj kaj kompenso pro profesiaj malsanoj.

Li ankaŭ anoncis, ke projekto de leĝo estas prezentita de la Germana Registaro al la Reichsrat por la senkondiĉa ratifiko de la Washingtona Okhora Konvencio.

S-ro Lawson, la Brita Registara reprezentanto, diris, ke projekto de leĝo por la ratifiko de tiu konvencio estas preparata kaj estos prezentita al la Deputitaro, kiam ĝi rekunvenos, kaj plej malfrue dum Novembro.

La Konsilantaro diskutis enketon farotan de la Oficejo pri la aĉetpovo de salajroj en diversaj urboj. La Konsilantaro konsentis principe al tiu enketo en Junio. La detaloj pri la enketo estis starigitaj la 9an de Septembro per konsento inter la Direktoro, tri reprezentantoj de la Konsilantaro kaj S-ro Filene, kiu proponis pagi al la Oficejo 25.000 dolarojn por garantii la kostojn de la enketo. La celo de la enketo estis precize difinita. Ĝi estas eltrovi la vivnivelon ebligita en Detroit per salajro da 6 dolaroj ĉiutage, kaj poste eltrovi kioma salajro devas esti pagata por certigi egalan vivnivelon en la koncernataj Eŭropaj urboj. La funkcio de la Oficejo estos provizi precizajn ciferojn per sciencaj metodoj. Ĉiu persono estos libera por fari konkludojn el tiuj ciferoj, kiel el iuj ajn aliaj informoj eldonitaj de la Oficejo.

La Konsilantaro konsideris rezolucion, akceptitan de la Kunveno de la Ligo de Nacioj en septembro, pri la laborhoroj, salajroj kaj ceteraj laborkondiĉoj en karbominejoj. La Konsilantaro akceptis la jenan rezolucion:

La Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo,

Konsiderante la rezolucion akceptitan de la Kunveno de la Ligo de Nacioj la 23an de septembro,

Kaj la leteron de la Sekretario Ĝenerala de la 1a de Oktobro sciigantan la Internacian Laboroficejon, ke « la Konsilantaro de la Ligo de Nacioj decidis la 25an de septembro efektivigi la peton faritan de la Kunveno, ke la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo estu petita, ke ĝi konsideru, ĉu estos eble enmeti en la tagordon de la Internacia Labora Konferenco en 1930 demandojn pri laborhoroj, salajroj kaj ceteraj laborkondiĉoj en karbominejoj, kun la celo, akceptigi internacian konvencion aŭ konvenciojn pri tiuj diversaj temoj ».

Komprenante la gravecon de la demandoj proponitaj en tiu rezolucio kaj ankaŭ la gravecon, ke la Internacia Labora Organizaĵo faru tujan kontribuon al la ĝenerala studo de la problemo pri karbo, kiun la Ligo de Nacioj nun faras laŭ propra iniciativo,

(Daŭrigo sekvos)

SKANDINAVIO

## La batalo kontraŭ la trustoj

En sia lasta jara ĝenerala kunveno, la Unuiĝo de Danaj Konsumkooperativoj decidis meti je la dispono de la Administra Komitato du milionojn da kronoj el la jara superresto por organizi batalon kontraŭ la industriaj trustoj, kiuj lasttempe fariĝis tre potencaj en diversaj kampoj.

La Danaj konsumkooperativoj ankaŭ traktis kun la societoj en la ceteraj nordaj landoj, kaj kun iliaj unuiĝoj, kiuj apartenas al la Skandinava Koopera Pogranda Societo. Ĉiuj interkonsentis pri Skandinava kunlaborado en ĉi tiu kampo. Komuna komitato kun kvin membroj estis do elektita, por studi la komercajn kondiĉojn en la fakoj koncernataj kaj proponi rimedojn.

La Sveda Unuiĝo estas reprezentita de S-roj Albin Johansson kaj Sörensen, la Norvega Unuiĝo de S-ro Waksdall, kaj la Dana Unuiĝo de S-roj Nielsen kaj Broberg. La du Finnaj Unuiĝoj plene apogas la kunlaboron, sed, pro la granda distanco, volas provizore ne sendi membrojn al la Komitato.

Ŝajnas ankaŭ, ke ĉiuj Skandinavaj federacioj estas pretaj por provizi la necesajn kapitalojn, se oni decidos organizi tiujn entreprenon.

La fakoj, en kiuj oni proponis agi, estis, unue, bruloleo kaj margarino, kaj post oni konsideris aliajn komercaĵojn, speciale artefaritajn sterkojn kaj karbon. Ĉiu agado entreprenata fariĝus kunlabore kun ekzistantaj kooperativaj entreprenoj.

GERMANUJO

## La kvalito de varoj provata de la agrikulturaj kooperativoj

La agrikulturaj kooperativoj sciigas, ke ili ne nur influas prezojn per la pogranda aĉeto de sterkoj kaj aliaj varoj, sed ke ili provas la kvaliton de la varoj aĉetataj. Artikolo en la bulteno de la agrikulturaj kooperativoj montras la valoron por kulturistoj de la kontrolo farita de la Nacia Federacio. El 19.409 provoj faritaj en 1927, 5.984 malkaŝis difektajn varojn, okazigis kompensopagon por 114.940 markoj, 103.081 por sterkoj, 9.983 por furaĝo kaj 1.876 por semaĵo. Tiel koopera aĉetado asekuras al la kulturisto tute bonajn varojn, kio estas nepre necesa kondiĉo por teknika progreso.

JAPANUJO

## Kooperativa organizo de kokonproduktantoj

La rapida kresko de kooperativoj de kokonproduktantoj en Japanujo klariĝas per la avantaĝoj kiujn koopera bobenado ĝuas super kapitalistaj entreprenoj.

La bobenanto ne povas produkti silkon de bonega kaj egala kvalito, se li ne estas provizata per kokonoj de bonega kaj egala kvalito. Sed la ordinara bobenanto akiras siajn kokonojn de diversaj fontoj, kaj sekve de diversaj kvalitoj. Kontraŭe, la kooperativoj povas bobeni silkon de kokonoj de egala kvalito provizitaj de siaj membroj.

La silkindustrio nuntempe suferas de la nesufiĉa kapitalo de individuaj produktantoj. Kooperativo povas havi plurajn centojn, eĉ plurajn milojn da membroj, ĉiu el kiuj kontribuas al la kapitalo. Siaj financo kaj administro estas kontrolataj de la kompetentaj aŭtoritatoj, kio certigas ke ili estu bonaj. Krom tio, kvazaŭoficialaj institucioj, kiel la Centra Banko por Kooperativoj kaj la Hipoteka Banko de Japanujo, provizas financan helpon, tiamaniere ke la kooperativoj havigas monon por tre malalta procento.

La problemo pri laboro estas grava por tiu industrio. Por produkti bonan silkon, oni bezonas la servojn de lertaj bobenantinoj, kaj dum la lastaj jaroj la dungo de tiaj laboristinoj fariĝis pli kaj plimalfacila. Ĉe silkkooperativo tamen la plimulto de la bobenantinoj estas filinoj aŭ fratinoj de membroj. La administrantoj kaj laboristinoj de tia kooperativo kvazaŭ konsistigas grandan familion kun identaj interesoj, kaj laborkonfliktoj apenaŭ estas eblaj.

La nombro da silkkooperativoj estas nun ĉirkaŭ kvarcent, kaj ili estas unuigitaj en naŭ distriktaj federacioj. Iliaj fabrikoj havas ĉirkaŭ tridek mil basenojn, kaj dum la jaro finiĝinta la 31an de Majo, 1927, ili sendis al la vendejoj de Jokohama kaj Kobe ĉirkaŭ 51.000 skatolojn aŭ 28.000 sakojn da kruda silko. Tiuj ciferoj reprezentas, pri la basenoj, 10 por cento, kaj pri la produkto, 6 por cento de la tuto en Japanujo.

La plej gravaj el tiuj societoj nun aliĝas al la Japana Kooperativa Federacio por Kruda Silko, kiu estis starigita en Jokohama la 15an de Marto 1927 por la rekta vendo de la produktoj de la aliĝintaj societoj, ne nur en la enlanda merkato, sed ankaŭ en la Usona merkato.

La kvanto da kruda silko, produktita de la kooperativoj apartenantaj al la Federacio kaj sendita al Jakohama kaj Kobe dum la nuna financa jaro, estas taksita je 38.000 skatoloj aŭ 22.000 sakoj. El tiu kvanto, ĉirkaŭ la duono estas ankoraŭ sendita al la firmoj, kiuj ĝis nun ricevis tiujn produktaĵojn, sed ankaŭ tiu porcio verŝajne iom post iom venos al la Federacio. La vendoj de la Federacio dum la jaro finiĝinta la 30an de Junio 1929 valoris 15.570.537 yen.

La Federacio apartenas al la Centra Unuiĝo de Kooperaj Societoj de Japanujo, kiu mem estas membro de la Internacia Koopera Alianco.

GRANDA BRITUJO

## Kooperativa vendo de Lano

Lasttempa raporto de la Konstanta Komitato de la Konsilantaro de Agrikulturo de Anglujo pri la Vendo de Indiĝena Lano montras, ke iuj agrikulturaj kooperativoj, depost multaj jaroj, vendas kooperative la lanon produktitan de siaj membroj. Ĉi tiu praktiko estis adoptita precipe por ŝpari fervojajn kaj aliajn kostojn per amasa transporto. Oni ne multe klopodis por plibonigi produkton aŭ trovi la plej bonajn vendometodojn. Dum la lastaj naŭ jaroj, tamen, la vendo de lano fariĝas ankaŭ de grandaj kooperativoj starigitaj sole por la laste diritaj celoj. Tiuj societoj klasifikas, pakas kaj premas la lanon, aŭ alimaniere preparas ĝin por vendado kaj antaŭpagas al la farmisto ĉirkaŭ 75 por cento de la probabla valoro de sia rekolto post tiu preparado. La klopodoj de tiuj societoj estis ĝenerale tre sukcesaj.

La raporto opinias, ke, por la plena sukceso de tiaj societoj, la produktantoj devus kontrakti kun la societo rajtigante ĝin ĉiun sian lanon, eble por tri jaroj. Nur du societoj, la Skota kaj la Orienta, aplikas tian sistemon.

La plej maljuna de tiuj societoj estas la *Kent Wool Growers Limited* (Lanproduktantoj de Kent). Starigite en 1920 kun 75 membroj, ĝi vendis en tiu jaro 25.00 felojn por £ 12.500, kaj la administraj kostoj estis 1 3/4 penco la funton. En 1928, ĝi havis 1.022 membrojn kaj vendis 209.000 felojn por £ 127.349, kun administraj kostoj de 3/4 penco la funton.